

KEF 2005

Interkonektiĝa Festivalo

Originiale aperinta artikolo en "La ondo de Esperanto", N-ro 8 (2005)

Intermiksiĝo de artistoj, muzikistoj, verkistoj publiko kaj eĉ de la konekto-kabloj estis la specifeco neatendita dum tiu ĉi 8a eldono de kulturpleno-riĉa festivalo. Tio ja rimarkeblis de la unua tago kiam la unuaj prezentiĝoj de artistoj okazis sursceneje kun Flavio Fonseca el Brazilo kaj Alejandro Cossavella el Argentino.

La anekdoto kiu min instigas tiele titoli tiun artikolon fontas el la unua prezento pro teknika problemeto pro kiu devis esti interŝanĝitaj la kabloj de la gitaroj de unu amplifilo al alia dum la improvizita prezentado de Flavio kaj Alejandro kiujn ankaŭ akompanis trumpete por kelkaj muzikoj David-Emil Wickström.

Kompreneble mikso de diversaj artistoj okazis konstante dum la festivalo en la "oficialaj" programeroj sed ankaŭ ekster la programo. Tiel eblis aŭskulti interalie muzikistojn de Esperanto-Desperado ludantaj kun JoMo, Martin Wiese de Persone, Ĵomart kaj Nataŝa, Flavio Fonseca, Alejandro Cossavella, Dolchamar kaj David-Emil.

Ĉi KEFa trumpetisto faris la performon ludi akompane en la koncertoj de Flavio Fonseca kaj de Esperanto-Desperado sed bedaŭrindege ne eblis por la spektaklo de Alejandro Cossavella...

Kulmino de tiu intermiksiĝo estis okaze de la karaokea vespero laŭ tute nova maniero inventita de la KEF-organizantoj kiam plej diversaj muzikistoj (eĉ la Ŝamano!) de diversaj bandoj kaj artistoj kune ludis muzikaĵojn de aliaj artistoj laŭ kiuj homoj el la publiko kantis la tekstojn (kaj nekredeble eĉ neesperantistaj gefinnoj tion sukcesis!!!) Kio ankaŭ estis mirige estas ke la KEFa publiko konis kaj kunkantis preskaŭ parkere ĉiujn kantojn laŭ longe de la festivalo! Dum tiu karaokeado eblis konstati la kaŝitan talenton de Jorge Camacho kiu kantis tekston de la vigla kaj rokenrola bando La Porkoj sed ankaŭ montris siajn kantokapablojn interalie Gunnar Fischer, Roger Grilo, aŭ Marteno Miniĥ....

Tre amuze kaj etosige estis la oftaj marmeladaj postkoncertoj ĝismalfrumatenaĵoj sur la scenejo de la KEFejo en kiuj miksiĝis la muzikistoj de la diversaj bandoj sed ankaŭ muzikistoj senbandaj kiaj Rogener Pavinski, Dĵ Kunar, Duncan Thomson, DĴ Roĝer, Petra Fantom, ktp....

Kion diri pri la programo....?

Gi vere estis elstarega kaj bonega... okazis brilegaj akustikaj koncertoj de Ĵomart, Nataŝa kaj Karina, de Dolchamar, de Flavio Fonseca, de Martin Wiese, de Timo Väänänen kaj de Alejandro Cossavella. Ensorĉis nin ankaŭ la lirika voĉo de Liisa Viinanen en nekredeble

amuza opera vespero.

Kaj esperanta Roko vibrigis la tutan klubejon “Liberte” kun la bonega koncerto de Dolchamar kaj de JoMo kaj Liberecanoj (kiu slavigis sian rokon... ne atendite de multaj)... Elstarega estis Esperanto Desperado la plej bona koncerto kiun mi iam ajn spektis de ĉi bando kiu vere atingis altnivelan kaj profesionan kvaliton. Kaj vere sovaĝa, kruda kaj rokenroleca (mi dirus eĉ Iggy Pop –eca) esti la koncerto de La Porkoj kiu furiozigis la publikon en la varmego de la klubejo. Ale, la kantisto estis eksterordinare vigla en sia porka kantludo... jes ja! freneziga etoso envolvis la publikon de Liberte ĉi nokte...

Pli trankvilaj momentoj okazis kun la teatraĵo “La familia etoso” prezentita de la Tuluza Teatra Trupo, Kaj kun la surscenejigo de erotika poezio.... aŭ ankaŭ mimdanca spektaklo de Kim kaj Villads Henriksen (la patro kaj la filo!).

Prelegoj kaj atelieroj abundis dum la tuta semajno pri literaturo kaj poezio (Jorge Camacho, Sten Johansson, Anja karkiainen, Probal Daŝgupta) pri kino, muziko (evoluo de espomuziko/Eurokka), esperanto en interreto (Artista Datenbazo kaj MusicExpress).

Desegnoarto ankaŭ ĝueblis kun la komiksa ekspozicio de la finna Duplustro kaj la kataluna senbrida Arnau Torras kiu eĉ prelegis kaj prezentis sian komiksanan albumkolekton.

Diversaj atelieroj okazis ankaŭ, pri danco (Mauro Tauzzi, Kim) pri popo, pri verkado, pri filmo-dublado, ktp...

Diskotekaj Dĵoj povis ĝis la dua matene dancigi la homojn kaj tiel la nedormema publiko povis dancadi laŭ la kadencoj kaj ritmoj diversaj de specifaj DĴ-oj:
La latinritma DĴ Arnau, La german-roka DĴ Kunar, la sudamerikritma DĴ Roĝer, la espoteka DĴ Flo kaj la pluretnmuzika DĴ Patrik.

La organizantoj ne forgesis eĉ aranĝi liberan tagon por sportigi piedirante la KEF-partoprenantojn .. fakte la ekskursita tago kiu ebligis al la KEFumantoj viziti la urbon matene kaj posttagmeze iri al la urba parka insulo Linnanmäki kie atendis nin spica vespermanĝo kaj strangmistera ŝamana vespero... pri kiuj ĉiuj ankoraŭ certe halucinas....

Kaj pri la gastigado kaj manĝoj estis perfekte, la amasloĝejo estis bonetosa kaj la manĝoj estis bonegaj eĉ por la vegetaranoj kaj veganoj...mi nur aŭdis plendojn pri la duŝejo nur unu por la tuta amasloĝejo kaj pli amuze, estis malantaŭ-sub la scenejo... Imagu kiam dum spektaklo aperas JoMo en kalsono de malantaŭ la sceneja kurteno... imagu la efekton.... ;-)

Konklude mi povas diri ke ĉi 8a KEF estis altkvalita pro ĝia diverseco kovranta ĉiujn

kampojn de esperanto-kulturo kaj specife la muzika abundo kaj elekto montris ĝian pintan elstaron .

Nur tiuj kiuj partoprenis kaj kunvivis la riĉegan kulturen etoson povas kompreni kaj pro tio mi dankegas al la organizantoj kiuj plenumis grandegan kaj vere profesionan laboron por doni al la festivalon tiom fortan, vigan kaj ĝojplenan animon.

Mi invitas vin vidi kelkajn bonajn fotojn de Sakari Kauppinen en jena retpaĝo :
<http://www.esperanto.fi/kef2005>

Dankegon Riitta, Katja, Taneli, Patrik, kaj aliaj ne malpligravaj kunlaborantoj...

Ni atendas la sekvan KEFon senpacience!

Do ĝis reKEF-o al ĉiuj !

Flo!